



**madrida esperanto-liceo**

**septembro 2011**

### **KURSO DE ESPERANTO EN LA SIDEJO DE MEL**

En septembro komenciĝos nova baza kurso de Esperanto, organizita de Madrida Esperanto-Liceo, gvidota de Pedro Hernández Úbeda. Ĝi okazos en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13, 3-7, de Madrido, ĉiujn sabatojn, inter la 11-a kaj la 13-a horoj, ĝis la fino de la jaro.

La tago de la komenco estos la 17-a de septembro. La kosto de la kurso, pagota en la unua tago, estas 20 eŭroj.

Oni povas peti pliajn informojn aŭ enskribiĝi sendante retpoŝtan mesaĝon al [info@esperanto.es](mailto:info@esperanto.es). Ankaŭ estas konvene aliĝi al la retlisto <http://es.groups.yahoo.com/group/esperantovallekas/> per sendo de malplena mesaĝo al [esperantovallekas-subscribe@yahoogroups.com](mailto:esperantovallekas-subscribe@yahoogroups.com).

### **TAGO DE ESPERANTO EN JULIO**

La 26-a de julio estas ĝenerale konsiderata kiel la datreveno de la lingvo Esperanto, ĉar en tiu tago aŭ alia tre proksima de 1887 estis eldonita la tiel nomata *Unua Libro* de Esperanto. Pro tio, diversaj organizaĵoj de la esperantista movado aranĝas agadojn kun rilato al nia lingvo.

Ĉijare, unu el la plej videblaj okazis en la socia reto Twitter, kie kelkaj centoj da samideanoj publikigis mesaĝojn en aŭ pri Esperanto, speciale etikeditajn per tiu vorto.

Ankaŭ en Madrido disolviĝis agado, eĉ se malpli ambicia, kaj pli distra: grupo de esperantistoj renkontiĝis por babili kaj bierumi en teraso de drinkejo en la centro de la ĉefurbo. Oni profitis la okazon por disdoni diplomojn al kelkaj madridanoj sukcesintaj en la ekzamenoj kiuj sub la ŝildo de KER organiziĝis dum la pasinta Hispana Kongreso en San Lorenzo de El Escorial.

La plej surprizan kaj samtempe formalan agadon oni ŝuldas al la pola prezidanteco de la Eŭropa Unio, kiu publikigis en sia oficiala retejo manifeston memorantan la 124-an datrevenon de la lingvo, kaj ties ligojn al Pollando. La teksto aperis en la pola, la angla kaj Esperanto mem.

### **JORGE CAMACHO KAJ AUGUSTO CASQUERO PREMIITAJ EN KOPENHAGO**

Jorge Camacho estis premiita en la eldono 2011 de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio, kiuj estis disdonitaj en la UK de Kopenhago. Eĉ dufoje, en la branĉo poezio. Li ricevis la unuan premion pro sia poemo “Sezonoj”, kaj la tria pro “Lokoj”.

Krome, iom anekdote, la tria premio en la branĉo pri eseo estis aljuĝita al Filippo Franceschi, el Italio, pro la verko “Post legado de «La mava lingvo»” (tiu ĉi en la titolo menciita verko, referencas al la tiunoma eseo de Camacho).

En la UK oni anoncis la nomojn de 12 Esperanto-aktivulojn, kiujn la Estraro de UEA decidis distingi per Diplomoj pri Elstara Agado kaj Elstara Arta Agado. Inter la honorigitaj troviĝas nia membro Augusto Casquero, pro sia instruado de Esperanto en Ĉinio kaj Vjetnamio.

### **UNUA ESPERANTA KINOFESTIVALO**

La unua Esperanta Kinofestivalo havis lokon dum la dua semajno de julio en San-Paŭlo, Brazilo, koincide kun tri samtempaj grandaj Esperanto-kongresoj: la Tutamerika Kongreso de Esperanto, la Brazila Kongreso de Esperanto kaj la Brazila Esperantista Junulara Kongreso. Ĝin organizis kaj direktis Aleksander Osincev el Rusio, kaj ĝi konsistis el la elsendo de diversaj filmoj kun rilato al Esperanto, plus konkurso de videoj en tri kategorioj: 5-sekundaj, 15-sekundaj kaj 30 sekundaj videoj.

En la konkurso kunlaboris du madridanoj. Manolo Pancorbo deĵoris kiel membro de la ĵurio. Kaj Andy Hernández Martínez atingis la trian premion en la kategorio 30-sekundaj videoj, per la filmeto "Elreviĝo kaj konsolo".

La videojn kaj pliajn detalojn de la konkurso eblas spekti en la retpaĝo <http://kinofestivalo.org/video/>.

### **KANALO DE HEF EN JUTUBO**

Hispana Esperanto Federacio vigligis sian kanalon de videoj en Jutubo (*Youtube*), per diversaj pecoj filmitaj en la 70-a Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Sankta Laŭrenco Eskoriala. Spektu ilin en la adreso: <http://www.youtube.com/user/esesperanto>.

Aliajn videojn eblas spekti en la kanaloj Ekstremoj, SvenaDun kaj Sinkopo. Ligoj al ili aperas en la ĵus menciita adreso.

### **ANONCOJ PRI PROKSIMAJ AGADOJ (EN LA IBERIA DUONINSULO)**

La 19-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo okazos ĉijare en la apudmara urbo Malgrat de Mar, provinco de Barcelono, de la 1-a ĝis la 8-a de oktobro 2011. Pliajn detalojn, en <http://personales.ya.com/semajno/>

La 25-a Renkontiĝo de Portugaliaj Esperantistoj okazos la duan semajnfino de oktobro (8-a kaj 9-a), en la norda limo de la Arĝenta Marbordo: plaĝ- kaj kazin-urbo Espinho.

La 35-a Kataluna Kongreso de Esperanto disvolviĝos en Barcelono inter la 28-a kaj la 31-a de oktobro, sub la temo "Plurlingvismo en Eŭropa Unio". Pliaj informoj estas troveblaj en <http://www.esperanto.cat/kongresoj/2011/index.php>

Oni konfirmis ke la venontjara junulara Iberia Renkontiĝo, kune organizata de la junularaj asocioj de la duoninsulo, okazos la unuan semajnfino de aprilo, dum paska semajno (5-a ĝis 8-a aprilo 2012) en la apudlisbona ĉemarklifa fiŝhavena kastelurbeto Sezimburo (Sesimbra).

### **VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

La 5-an de septembro estos reinaŭguritaj la lundaj kunvenoj de MEL, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13. Ili komenciĝos je la 18,30h

La 12-an de septembro vizitos la sidejon Faustino Castaño el Gijón. Oni ankaŭ antaŭvidas la ĉeeston en Madrido dum kelkaj tagoj meze de septembro, de japania samideano Tsukuru Harada.

**La 26-a de septembro estis kunvokita aparta kunveno de MEL-anoj, en la sidejo, por diskuti pri venontaj agadoj kaj projektoj. Ĉeestu kaj partoprenu!**

Pri aliaj novaĵoj, atentu la diskonigojn en la retforumo pri Esperanto en Madrido [http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto\\_madrیده](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrیده).

**NOTO:** Memoru ke, kiel ni anoncis en lasta numero, oni serĉas novan redaktoron por tiu ĉi bulteno. Kandidatoj anoncu sin ĉe la adreso de MEL.

## **madrida esperanto-liceo**

San Alejandro 6-4<sup>o</sup>B-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3<sup>o</sup>-7, Madrid

<http://www.esperanto.es/mel/>

[saluton@wanadoo.es](mailto:saluton@wanadoo.es)

Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al [niavocho@gmail.com](mailto:niavocho@gmail.com)